# KOMITATO de 25-a de januaro 2026

Dimanĉon la 25-an de januaro 2026, de la 10a ĝis la 16a30, kunvenis pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.

[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ELEKTO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | 23/25 | S | | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | **20/22/24** | S | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | 23/25 | S | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | **2025** | R | | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | **22/24** | S | | | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | 23/25 | S | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | 23/25 | S | | | |
| Victor | SIMONNET | VS | Repr. de la membraro | 2025 | S | | | |
| Bertrand | VERSTRAETE | BV | Repr. de la membraro | 2025 | R | | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | | S | | | |
| Isabelle | NICOLAS | IN | Repr. de fed. Limousin | | S | | | |
| Xavier | DEWIDEHEM | XD | Repr. de fed. Hauts-de-France | | R | | | |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | | S | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | | R | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | | S | | | |
| Briac | MILLON | BM | Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes | | R | | | |

19 ĉeestis el 19, 0 senkulpiĝis, 0 donis povon.
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min

XG prezidas, MP protokolas helpe de VS kaj BF

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj**
**Ĝisdatigo de la listo de la partoprenantoj :** 5 min

- ne plu ekzistas la federacio Aŭvernjo kies reprezantinton ni konservis erare en la listo de komitatanoj dum pasintaj kunvenoj.
- ne partoprenis Clément Rousset ekde de pluraj monatoj en la estrarkunvenoj kaj komitatkunvenoj. Thierry S. kiu loĝas en sama urbo ankaŭ konfirmas ke li ne havis informon de li de multaj monatoj. De fakte, li demisiis. Ni do ĝisdatigis la liston en tiu protokolo kaj en la diskutlisto.

Kongresoj kaj ĝemelaj urboj estos traktitaj je la komenco de la posttagmezo.

0.4 **Dato de la venontaj kunsidoj** 4 min

- rete lundon 23a de marto je la 20a
- rete lundon 11a de majo je la 20a (unu semajno antaŭ la kongreso)
- fizike dum la kongreso, post la membrokunveno sabaton 23a je la 16a

*(Estrara kunveno : 2a de februaro je la 20a)*

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Financa raporto 2023/2024.** **DISKUTO** 10 min
https://esperanto-france.org/finances/2024

- kelkaj mistajpoj de datoj temporabe troveblaj
- ankoraŭ kelkaj paŝetoj farotaj.

**Financa raporto 2024/2025**
**https://esperanto-france.org/finances/2025 (estos videbla post finpretigo)**
Ni antaŭvidas malprofiton.
Ni bezonas fortigi la grupon pri financoj.

1.2 **Protokolo de la lasta komitatkunsido** **DISKUTO** 5 min
https://esperanto-france.org/conseil-d-administration
Disponebla ĉe la retejo de Esperanto France

1.3 **Aliĝilo 2025/2026: lokaj kotizoj + donacoj** **INFORMO** 5 min
452+5=457 aliĝintoj hodiaŭ (427 samdate lastan jaron)
Xavier sendos la liston de la alinĝintoj de la nuna kaj antaŭa jaro al la lokaj estraranoj
Aliĝintoj al UEA : mankas 120 inter la pasinta jaro kaj la nuna. Atentigo : eble ne estas je la samaj datoj, necesas kompari kun finjaraj aliĝintoj pasintjare.

1.4 **Preparado de la 2026a ĝenerala asembleo** **DISKUTO** **20** min

- preparado de la jara raporto. Raporto pri la agado de la diversaj lokaj kluboj/federacioj : precizu la eksterordinarajn agadojn aŭ novajn agadojn. Kutime multaj redirâĵoj kompare kun antaŭaj jaroj do strebi plifaciligi la legeblecon. Indiki maksimuman volumon por la lokaj jarraportoj. Bonvolu sendi la jarraportojn antaŭ fino de Marto al sekretario@esperanto-france.org
- aktivuloj@esperanto-france.org por alvoki la raportojn
- listo de kandidatoj kaj novaj kandidatoj por la venonta ĝenerala asembleo (lasta kk)
- ĝisdatigo de la listo de kandidatoj de la pasintaj jaroj (ŝajnas ke neniu el la estraro devas forlasi la rolon)

1.5 **Staĝanto pri la sociaj retoj** **DECIDO** 5 min
Ĉu ni dungos staĝanton ? Ni strebis trovi prizorganton antaŭ fino de Januaro sed konstatas ke ne estas homfortoj por fari tion en Esperanto France nek en JEFO.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 **Ĝisdatigo de niaj komunikiloj : nova logotipo, faldfolio** **DECIDO** 10 min
<u>1- logotipo</u> : Voĉdonado okazis inter 24 proponoj. 233 voĉdonantoj partoprenis.

# Elekto de nova logobildo por Espéranto-France

• Question [Mettre en ordre]

☐ Logo actuel

☐ Logo A

☐ Logo B

☐ Logo C

☐ Logo D

☐ Logo E

☐ Logo F

☐ Logo G

☐ Logo H

☐ Logo I


☐ Logo J

## Rezultoj de la balotado :


- Enketo ĉe membroj de Espéranto-France kaj simpatiantoj tra Esperanto Aktiv’
- Respondoj inter la kaj la 21an de januaro 2026

→ **233 respondoj**

Klasifikado de la 3 unuaj elektoj :




Klasifikado de ĉiuj elektoj :



Logotipo elektita :

<u>Statistikoj</u> :

**Classement 1:**

| Choix de réponses | Réponses | Pourcentage de réponses |
|---|---|---|
| Logo A | 35 | 15.02% |
| Logo actuel | 36 | 15.45% |
| Logo B | 15 | 6.44% |
| Logo C | 13 | 5.58% |
| Logo D | 69 | 29.61% |
| Logo E | 6 | 2.58% |
| Logo F | 0 | 0% |
| Logo G | 17 | 7.3% |
| Logo H | 34 | 14.59% |
| Logo I | 3 | 1.29% |
| Logo J | 5 | 2.15% |
| **Nombre valide par participant** | **233** | |

KK devas decidi la finan logotipon kiun ni uzos. KK aprobis unuanime. Necesas iom pli prilabori tiun logotipon do ni povos peti al EM fari tion. Poste ni bezonos ricevi la finan sub diversaj formoj por la kutima uzado de la lokaj kluboj :
La logotipo nuna (kaj venonta) estas disponebla ĉe :
https://esperanto-france.org/charte-graphique-et-logos?lang=fr

<u>2- Faldfolio</u> : estis unua provo kun proponoj ricevitaj antaŭ pli ol unu jaro. Ni modifis la enhavon (tekstoj kaj fotoj) laŭ proponoj sed ni atendis aprobon de logotipo. Restas loko por loka stampilo kun informoj kaj momente ludo kun kelkaj demandoj ne plu sendindaj sed eblos retrovi la korekton sur la retejo.

2.2 **Lanĉo de trejnad-sesioj: raporto pri la hieraŭa laborgrupo** **INFORMO** 10 min
Okazis la unua trejnad-sesio pri Arthur uzante la liston aktivuloj@esperanto-france.org por inviti

partoprenontojn. 64 membroj estas en la listo : prezidanto, sekretario kaj kasisto de la lokaj grupoj. Tiu listo povos helpi la lokajn aktivulojn rilati kun la aliaj.
Arthur : datumbazo estis prezentita kaj kiel uzi ĝin ankaŭ.
Ĉirkaŭ 20 homoj partoprenis samtempe : 10 fizike kaj proksimume 10 rete. La plej uzata versio estas "Arthur2". 40 homoj konektiĝis ĉe Arthur dum la sama tago, sed ne nur por la kunveno.
Efika kunveno kaj interŝanĝo.

Alia temo aludita estis pri la arkivoj de Esperanto France: 7 liniaj metroj da papero foriros de la sidejo. Do ĉar ŝanĝoj okazas en niaj kutimoj por kunlabori, ni bezonas novajn kompetentojn. Ni do devas trejni la membraron pri diversaj temoj.

2.1 **Venontaj laborgrupoj kun lokaj aktivuloj** **DISKUTO** 10 min
Necesos refari tiun laborgrupon poste. Propono de preleganto pri kiel efike allogi homojn al kurso laŭ loka sperto. (Propono de la prezidanto de la Liono-grupo)

Unu dum februaro, vespere nur per reto, dulingve. Se okazas en esperanto, ebleco inkluzivi en AMO seminario (kadre de UEA agadoj). Pormomente la sekvaj estos dulingvaj.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 ***Le Monde de l'Espéranto*** **DISKUTO** 10 min
Rezultoj pri la lasta kunveno de la teamo (okazinta la 21a de januaro)

- monata kunveno, jam kelkaj artikoloj estas pretaj kaj la skizo de la revuo estas farita
- la unua nova numero aperos antaŭ la nacia kongreso kaj temos pri la nuna situacio de Esperanto en Francio kaj iomete ankaŭ en la mondo
- la nova numero havos 32 paĝojn kaj prefereble dulingvajn paĝojn
- Ni celas aperigi unu numeron jare
- Céline B povas ricevi artikolon de ĉiuj grupoj, ŝi rajtas uzi la liston aktivuloj@esperanto-france.org

**3.2 Esperanto Aktiv**
Aperos ĉirkaŭ le 21a de Februaro. Intervjuo de Arnaud Lagrange. Kelkaj artikoloj aperintoj en aliaj ĵurnaloj sed kelkaj aliaj informoj. Limdato por sendi informojn: 15a de Februaro.

3.3 **Kongreso 2026** **INFORMO** 10 min

- de la 15a de januaro 2026 la retejo pri la kongreso estas alirebla. Ankoraŭ mankas la reta aliĝilo.
- Preparado momente bone progresas. Nur misokazis komunikado kun la kinejo. Malfacilaĵoj pri ekskursoj ĉar en la klubo fluaj esperantistoj tro maljuniĝis por gvidi plurhoran promenadon piede. François Plantade, kiu respondecas pri ĝia organizado, fidas pri la antaŭkongreso pri matematiko kaj Esperanto. Peto de diversaj verkistoj kiuj ŝatus vendi siajn librojn se ne estas disponeblaj en la katologo de la libroservo de UFE.
- Momente nur EDE petis salonon por renkontiĝo. FKEA partoprenos multlingvan meson en la urbo.
- ĝis nun 8 aliĝintoj, limdato por la unua periodo 19a de aprilo
- instigi aliĝi antaŭ ĉi merkrede por rezervi trajnon
- jam informo pri la nacia kongreso estas ĉe eventaservo
- Krei telegramgrupon por kunordigado inter partoprenantoj
- Bertrand proponas ke iu el la departamentaj arkivistoj ĉeestu la kongreson kaj respondu la demandojn

3.4 **Kongresoj 2027 kaj 2028** **DISKUTO** 15 min
UK okazos en Aŭstralio, do ĉu denove pli ampleksa kongreso en 2027 kiel en Strasburgo? Eo France kaj Eo Germanio alportas proksimume po 150 partoprenantojn.
LKK el Provenco ne tre ŝatus prepari eŭropan kongreson : ĝis 300 partoprenontoj. *(finfine aprobis poste)*
Kongresejo : 2 lokoj dekstren kaj maldekstren de la Canebière, Maison des associations (ne disponebla dimanĉe kaj lunde) ou Faculté de Droit (1 amfiteatro (135 lokoj), 1 kun 300 lokoj kaj 1 unu por 900 lokoj kaj klassĉambroj
Post la sabato, 13a, oficiala demando kaj pago de la sekurecaj agentoj.
260 euroj po ĉambro, 1500 por la halo kaj 600 po amfiteatro : ĉio ŝajnas fleksebla.

Je la 63a de la Canebière, 2 amfiteatroj kaj unu el ili estas uzebla kiel teatra loko, kun 250 partoprenontoj.. La kotizoj por la partoprenontoj estos pli multekostaj ol en Hérouville.
Se 2 aù 3 landoj partoprenas, eblas havi financojn el Eŭropa Unio. Necesas tre frue subvencipeti kadre de pli vasta projekto. Indas kontakti Kosmon (Francesco Maurelli kaj Sara Spanò)
Verdaj skoltoj ŝatus kongresi dum 2027 apud Marseijlo : 20 personoj eble. RC demandos ĉu ili povus zorgi pri infanoj ek de la 8a. Ili povas zorgi infanojn eĉ se ili ne parolas Esperanton.
Ĉu organizi prelegon "juro kaj lingvo" en la universitato : Michele Gazzola.
RC skribos al landaj asocioj : itala, katalunia. Eo provenco preparas la budgeton.

Pri la financa aspekto, subteno de la urba kaj metropola devas atendi kelkajn monatojn post lokaj balotoj.

2028 : RC partoprenos la ĝenerala asembleo en Lilo la 8an de marto 2026 kaj diskutos pri la eventuala organizo de la kongreso por festi la 120 jariĝo de la norda francia federacio.

2029 aŭ pli malfrue : Parizo

3.5 **Projektoj pri Arkivoj** **INFORMO** 5 min
La arkivoj el la sidejo estas pretaj por foriri al naciaj arkivoj : tio estos en la Esperanto Fundo. Ĉiuj tiuj dokumentoj estos libere konsulteblaj. Multaj homoj interesiĝis pri fari la staĝon kun la servo de naciaj arkivoj.
La lokaj grupoj kaj individuoj povas ankaŭ transdoni la arkivojn al Esperanto France.
La revuoj kaj libroj kiuj jam estas arkivitaj ne interesas la naciajn arkivojn. Ĉio kio koncernas la mastrumadon de la grupoj interesas la arkivojn.
Ĉiuj malmoldiskoj aŭ memordiskoj interesas la arkivojn.
La arkivistoj kontrolos ĉion, kaj tio kio estas privata ne estos libere konsulteblaj.
Xavier sendos mesaĝon al la listo aktivuloj.

La subvencio petata dum 2025 estis rifuzita , PDG proponas ke ni provu denove. Li kontaktos la respondeculojn por kompreni la ŝancojn por sukceso.

Ekzistas retejo : bitarkivo.org en kiu multaj revuoj en Esperanto estas arkivitaj. Ankaŭ ekzistas telegramgrupo pri tio.

3.6 **Starigo de teamo pri prelegvojaĝoj** **DISKUTO** 5 min
kun naciaj kaj regionaj respondeculoj. Ekzistas diskutlisto prelegturneoj@esperanto-france.org. Dennis Keefe ŝatus prelegi pri organizo de lingvaj festivaloj aŭ instruado de Esperanto. Disponebleco post la somero 2026.

3.7 **Rilatoj kun la federacioj kaj la lokaj grupoj** **DISKUTO** 10 min
- informo pri la malapero de la federacio de Aŭvernjo
- informo pri la agnosko de Esperanto Loiret kiel asocio aktiva en la lernejoj. Se kelkaj aliaj lokaj asocioj havus saman agnoskon, eblus havi tutlandan agnoskon. Ĉu tio povus esti temo por trejnadsesio ?
- nova federacio okcitanio : se ĝi aliĝas al Esperanto France ĝi ricevos la monon el la du antaŭaj federacioj "Languedoc-roussillonRoussillon"" kaj "midi pyrénées". Subskribo de iu kontrakto inter la federacio kaj la nacia asocio. Se tio okazas, necesas ke tiu federacio ekzistu en la datumo de Arthur. Midi-Pyrénées"

3.8 **Malfacila situacio de Kvinpetalo, ebla helpo de UFE** **DISKUTO** 5 min
- vidu mesaĝon de membro de Kvinpetalo kun reago de XG ĉu io nova? Ni interesiĝu pri ĝia funkciado kaj priprensu kiel helpi. La staĝoj estis altnivelaj sed nun post la morto de Claude, mankas projektoj kaj homfortoj.
- serĉu kunlaboradon kun aliaj lokaj grupoj, aliaj asocioj…
- tre grava biblioteko, do ni prizorgu la futuron.
- en la nova numero de LME, ni parolos pri la diversaj asocioj kiuj ekzistas en Francio do estos loko por Kvinpetalo.

3.9 **Ambiciaj projektoj de Greziljono, ebla apogo de UFE** **DISKUTO** 10 min

Novaĵoj pri la situacio : paro de du hungaroj nun loĝas tie : Veronika Acsadi kaj Andras. Veronika bone konata kaj sperta pri organizo de gravaj eventoj. Veronika propre laboras en internacia kompanio kaj Andras lernos la francan kaj poste serĉos laboron surloke. Andras ne ankoraŭ parolas Esperanton. La teamo de Greziljono plifortiĝas.

3.10 **Venontaj eldonoj** **INFORMO** 5 min

- Emmanuelle Richard informas ke printempe aperos libroj :
    - de Laure Patas d'Illiers (noveloj "Legu min ie ajn") : kontrakto jam subskibita de Xavier
    - romano de Said "Paradizo" : kontrakto ankaŭ subskribita de Xavier
    - ĉefaj verkoj de lukiano (traduko de antikva libro de Lucien de Samosate far de Gerrit Betveling)en la oriento/okcidento fako de UEA

Tiuj tri libroj estos disponeblaj dum la kongreso.

-

3.11 **UK 2026 en Graz Aŭstrio** **INFORMO** 5 min

- 36 aliĝintoj el Francio
- https://uk.esperanto.net/2026/ por pliaj informoj

Okazis reta prelego vendrede kunorganizita de LEK-Antverpeno.

Okazos reta prelego pri diversaj kongresoj marde organizita de FEI

3.12 De la **Studentlaboro pri Esperantujo** **INFORMO** 5 min

https://ethnologie.unistra.fr/vie-etudiante/journees-detudes-des-etudiantes-de-master-2/journee-detude-m2-promotion-2024-2025/

Studentino el Strasburgo studis esperantujon,

Laboro de strasburga studentino, petu pliajn informojn al BF por scii pli.

3.13 Muziko en Esperantujo

Vinilkosmo kaj Eŭroka estas en malfacila situacio ĉar Believe kiu distribuis la kontojn sur Spotify kaj volas rompi la kontrakton. Alia distribuanto estas proponata kiu postulas ĉirkaŭ 40€ po artisto. Spotify decidis ŝanĝi politikon por ne plu pagi por kantoj aŭskultitaj malpli ol 1000 foje jare. Vinilkosmo ricevis helpon de UEA por ĉijare. Indos studi la eblecon helpi pere de donacoj al UFE.

## 4. KAPABLIGO (kursoj, ekzamenoj...)

4.1 **Ekzamenoj** **INFORMO** 5 min

Pri KER: Niveloj B1, B2, C1 kaj C2 dum UK kaj en Greziljono dum "Printempas" aprilo 2026 surloke.

Rete dum julio, detaloj en la retejo de Edukado.net https://edukado.net/novajhoj?id=936.

Pri FEI : dum kongreso en Hérouville Saint-Clair

**4.2 Metodo 12** **INFORMO** 5 min

Robin ne sukcesas konfirmi liverdaton pro tro da laboro. Akademianoj progresas en relegado.

Ĝi pretos por septembro 2027? Restas sufiĉe por vendi ĝis tiam.